FERVOJA ESPERNTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner - Esperanto - Vereinigung
in der Stiftung Bahn - Sozialwerk

Fondita 1952 Numero 2 Aprilo / Junio 2000



Ĝis revido en Berlin.

La 44a Jarkunveno, de la 6a ĝis 8a de oktobro 2000

IFEF kongresis la kvaran fojon en Hungario

Budapest, mondkonata metropolo de Hungario, estis dum unu semajno (13. - 19. 05. 2000) centro de fervojistoj, kiujn interligas la komuna lingvo Esperanto. Somera vetero atendis kongresanojn el 24 landoj. Dum la inaŭguro altranguloj de la Hungaraj Ŝtatfervojoj (MAV), vicgeneraldirektoro G. Bajnaj kaj fervoja direktoro L. Ábrahám, emfazis la signifon de kunlaboro inter fervojo kaj Esperanto. Ili alte taksis la fakan agadon kaj akcentis la sloganon de la organzantoj „Eŭropo bezonas la fervojojn".

La Internacia Fervojista Federacio por Kulturo kaj Libertempo (FISAIC) estas reprezentita de sia prezidanto G. Schmit. Li laŭdis la Esperantoagadon inter fervojistoj kiel valoran kontribuon al la kulturo. Por la Universala Esperanto.-Asocio (UEA) P. Chrdle alte estimis la terminologian laboron de IFEF. Emocie la preskaŭ 280 kunvenintoj sekvis la salutojn de aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj de la landaj asocioj. Por Germana Esperanta Asocio (GEFA) ties prezidanto J. Gießner transdonis la salutojn. D-ro R. Bolognesi, prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) bonvenigis la ĉeestantaron, komunikis la honorigon de du meritplenaj kolegoj en Ĉeĥio kaj Hungario kaj deklaris la 52an kongreson malfermita. La solenan inaŭguron akompanis per klasika muziko la kamer-orkestro de la fervoja muziklernejo.

Grava parto de la kongreso estis la fervojfaka laboro. La serion de fakprelegoj malfermis D-ro Halász pri temo aparte aktuala en Hungario: La traknivelaj pasejoj. Da tiaj ekzistas pli ol 6000 laŭlonge de la 7000 km longa fervojreto. La problemo estas kompleksa; ĝi havas teknikan, juran, ekonomian, eĉ politikan interrilatojn. La sekvaj prelegoj okupiĝis pri nova fervoja energicentralo en alpa monto de Svisio, plue pri pligrandigo de la dana fervojreto, pri nova teknologio por fervojaj transportoj en Rumanio, kaj fine estas prezentita nova motorkompletaĵo en Ĉeĥio. Certan fakan karakteron havis ekskurso al kaj per la etŝpura infanvervojo ĉe la periferio de Budapest. Konstruita antaŭ 50 jaroj ĝi daŭrigas sian taskon: interesigi infanojn pri la fervojo per praktika kunlaboro. Interesigi en la deponejo nostalgiaj vagonoj kaj lokomotivoj. La komuna veturado en senfenestra trajno tra mirinda arbaregiono restos en bona memoro. La bazo por la fervojfaka laboro estas fakterminoj. Depost kelkaj jaroj IFEF estas reprezentata kiel konstanta kunlaboranto en la terminologia sekcio de la Internacia Fervojunio (UIC). La terminara komisiono tradukas ĉiujn novajn terminojn de UIC, kiu eldonas ilin sur CD-ROM. Tio ebligis intertempe la eldonon de IFEF-terminaro verdkolore bindita. Suplemento aperos surbaze de la 2a kaj 3a CD-ROM.

Rondveturo tra larĝaj avenuoj kun noblaj vilaoj kondukis al vidindaĵoj de Budapest. Sur la vasta placo de Herooj gigantaj figuroj el bronco memorigis pri la historio ekde la patrujokupo ĝis la 19a jarcento. Sur la alia flanko de

la riverego Danubo ofertis sin sur la altaĵo mirinda panoramo. La kupolo de la parlamentejo brilis en printempa suno. Kun bedaŭro la ekskursantoj forlasis la grandan preĝejon Matiaso, la imponan monumenton Triunuon kaj la Fiŝkaptistan Bastionon. Preter la citadelo kaj tra la Elizabet-ponto la aŭtobusoj reveturis. Celo de la tuttaga ekskurso per moderna trajno estis la urbo Eger. Post la vizito de la dutura baziliko la ĉefepiskopa biblioteko montris siajn altvalorajn librojn. La barokan salonegon ornamas fresko sur la plafono, kiu montras la eventojn de la sinodo en Konstanz antaŭ 400 jaroj. Kiajn terurajn periodojn travivis la urbo, ilustris gvidantino en la ruinoj de la iama fortikaĵo: invado de mongoloj, atakon de husanoj kaj sieĝon de turkoj. Muzeo komunikas pri la eventoriĉa historio. Preferindis la sekva restado en la t.n. Belulinvalo. Kelneroj alportis tipe hungaran manĝon. Blanka kaj ruĝa vinoj produktitaj en tiu regiono stimulis al gaja etoso.
Inter la kulturaj programeroj menciindas precipe la nacia vespero. Granda fervojista orkestro prezentis vere popolajn kaj klasikajn muzikaĵojn de la 19a jarcento. Apartan aplaŭdon ricevis grupoj en belegaj folkloraj kostumoj. Iliajn variajn dancojn akompanis muzikistoj per parte vigla instrumentaro. Revenante per aŭtobusoj oni admiris la iluminatan metropolon. Neforgesebla aspekto. Dum alia vespero fervojista koruso prezentis popolkantojn el diversaj landoj, eĉ unu en Esperanto. Kostumitaj artistoj aŭdiĝis kantojn el konataj hungaraj operetoj. Fine ankaŭ gejunuloj de la muziklernejo montris sian kapablecon per popularaj kanzonoj. La aplaŭdo estis merita. Tra la programo de ambaŭ vesperoj ĉarme gvidis Éva Farkas-Tatár.

En la plenumkunsido la IFEF-estraro traktis kun la komitatanoj abundan tagordon. Temis pri pasintaj kaj estontaj aranĝoj, ankaŭ pri nove elektitaj funkciuloj. Detalojn oni legu en la IFEF-organo. Bedaŭrinde ne plu ekzistas landaj asocioj en Hispanio, Nederlando kaj Svedio. Pli ol 70% de la membraro trapasis la 70an jaraĝon. La venonta IFEF-kongreso okazos en Tábor (Ĉeĥio) inter la 12a kaj 19a de majo 2001. La sekva en 2002 estos en Plovdiv (Bulgario). Telegramstile menciindas gazetara konferenco, bone vizitita ekumena diservo, portempa speciala poŝtostampo, digna akcepto de delegitaro en la fervoja direkcio, ekspozicio de pentraĵoj en la kongresejo krome librovendejo, multnombraj eteraj kontaktoj de radioamatora stacio, abunda bankedo, poste vigla dancado, modele eldonita kongresbultenoj,diligente laboranta LKK kaj servopretaj helpantoj. Al ĉiuj, precipe al István Gulyás, dankis sincere IFEF-prezidanto D-ro R. Bolognesi kaj fermis la kongreson. La ĉeĥaj kolegoj transprenis la flagon. Kun la Esperanto-himno finiĝis la brila 52a IFEF-kongreso. W.B.

La Postkongreso de la 52a Internacia Fervojista Kongreso
La centra loko de la postkongreso estis la urbo Sopron. Tri tagojn loĝis la 38 partoprenantoj en la luksa hotelo Maroni, situanta en parka regiono.

Tri tagojn de la 20a ĝis la 23a de majo ni estis okupitaj per tre agrablaj vesperoj kaj interesaj ekskursoj.
La unua ekskurso gvidis nin al la urbo Fertörákos norde de Sopron. Ni vizitis la famajn kalkŝton-minejojn, kiuj liveris mondvaste la materialon por skulpturoj. Vespere ni esploris piede la belan urbon Sopron. Rimarkindaj estas la multaj tipe hungaraj vinkeloj, iun kaj tiun ni ja kun plezuro vizitis.
Ni vizitis multajn interesajn lokojn kaj urbojn, kiel Györ, en kiu la preĝejo de Karmelanoj menciindas. Precipe bela estis la kastelo Eszterházy en Fertöd, sed ankaŭ Köszeg, pro siaj historiaj konstruaĵoj estas la „juvelskatolo" de la departemento de Vas kaj en Pannonhalma ni rigardis la faman bazilikon . Tiel ni vidis rondveturante per nia aŭtobuso multajn belajn lokojn.
Estis tre bela postkongreso. Sendube, ĉiu el la partoprenantoj kun ĝojo rememoras al la belaj komunaj vesperoj kaj la imponaj vidindaĵoj.
Dankon al la organizantoj. Heinz Schindler



Berlin ist eine Reise wert!

Die Jahresversammlung in Berlin (6. bis 8. Oktober 2000) ist dieses Mal besonders interessant und sehr gut organisiert. Wir wohnen alle in demselben Hotel, der Ausflug, die Führungen, die Wiedersehensfreude – und noch viele andere Gründe bestehen für Sie, nach Berlin zu kommen. Lesen Sie in FE (Fervoja Esperantisto) 1/2000 nach, dort finden Sie auch ein Anmeldeformular.
Wir freuen uns SIE wiederzusehen! Melden Sie sich an für unsere JV in BERLIN.

Hg

Wohin??? Auf nach Berlin, zur Jahresversammlung, es lohnt sich!!!

Goldene Hochzeit Margret und Willi Brandenburg



Magret und Willi Brandenburg feierten ihre Goldene Hochzeit in der Stadt Brandenburg Hier mit dem Oberbürgermeister

Am 1. April 2000 jährte sich der Hochzeitstag von Margret und Willi Brandenburg zum 50. Male.
Doch zuerst gratulieren wir Magret und Willi nochmals nachträglich, dass sie diesen Tag erreicht haben und wünschen ihnen noch viele gute gemeinsame Jahre.
Beide wurden durch die internationale Sprache Esperanto zusammengeführt. Diese Sprache prägte ihr gemeinsames Leben so stark, dass wir eine kurze Schilderung ihres „Esperanto-Lebens" geben wollen.

Dieser Bericht zeigt, dass Esperanto weit mehr ist als ein bloßes Hilfsmittel zur Verständigung.

Willi, 78 Jahre alt, war Ingenieur bei der DB. Er lernte Esperanto 1947, Kursleiterprüfung 1949. Er kam mit vielen, damals maßgebenden Esperantisten zusammen.

Er gab Kurse an der Eisenbahn-Fachschule mit bis zu 150 Teilnehmern.

Schon 1948 gründete er die Nachkriegs - Esperantoguppe in Münster. 1949 lernte er Margret kennen. Am 1.4.1950 heirateten sie. 1950 und 1952 die Kinder Ullrich und Guido, 1960 Judith. Willi und Margret beschlossen, diese Kinder zweisprachig zu erziehen, Esperanto als Sprache neben dem Deutschen zu benutzen. Dadurch lernten die Kinder beide Sprachen gleich fließend zu beherrschen. Außerdem erleichterte ihnen das logische Esperanto später das Erlernen anderer Sprachen.

Ab 1956 waren Margret und Willi aktiv bei der Durchführung der Kinderkongresse in den Esperanto-Weltkongressen in Kopenhagen, Marseille, Mainz, Brüssel u.a. beteiligt oder leiteten sie.

Von 1951 bis 1968 war Willi Bezirksbeauftragter in Münster und sechs Jahre Leiter des Ausschusses für Fachvorträge (IFEF), drei Jahre GEFA-Präsident. Beide besuchten zahlreiche IFEF-Kongresse, Jahresversammlungen und andere nationale und internationale Veranstaltungen. Viele Vorträge, Berichte und Artikel hatten Willi als Verfasser. 1973 übernahm er die Funktion eines Prüfungskommissars in der damaligen GEFA-Prüfungskommission. Oft vertrat Willi GEFA in den IFEF-Kongressen als einer der deutschen Delegierten. Jahrelang war er Mitarbeiter der Zeitschrift „Monato".

Im öffentlichen Leben betätigten sich beide als Schöffen und im Stadtrat. 1980 gründeten beide die Hilfsgemeinschaft „Bona Espero" für das Kinderdorf gleichen Namens in Brasilien. Margret leitete diese Gemeinschaft bis 1993. Viele Jahre bearbeitete sie mit ihren vielseitigen Erfahrungen im mehrprachigen Familienleben die Kinderseite von „Monato".

Einen wesentlichen Teil an der glatten Durchführung des 44. IFEF-Kongresses in Münster verdankten wir dem unermüdlichen Einsatz von Margret und Willi. Trotz mancher gesundheitlicher Behinderung, über die sie nicht viele Worte verlieren, haben sie sich ihren Einsatzwillen und ihre Lebensfreude bis heute bewahrt. Dass es noch lange so bleiben möge, wünschen wir ihnen von Herzen.

Gießner, Präsident GEFA

Die Senioren trafen sich in Düsseldorf

Am 13. April war es wieder soweit: 16 Senioren kamen in Düsseldorf zusammen, um einige schöne, gemeinsame Stunden zu verbringen. Rolf Terjung hatte alles vorzüglich vorbereitet und organisiert. Heinz Schindler wurde von zwei Kasachinnen begleitet, die bei ihm zu Besuch waren. Dadurch wurde das Treffen besonders interessant, zumal beide fließend Esperanto sprachen.

Nach der Begrüßung berichtete Rolf Terjung von der Geschichte Düsseldorfs und dem Bergischen Land. Es war ein interessanter Vortrag. Einige



Anwesende hatten etwas vorzutragen, aber der Höhepunkt war, dass eine der Gäste, Lena Aleksejenko, Volkstänze in sehr schmucker Nationaltracht vorführte. Wir waren begeistert und dankbar für diese schöne Darbietung.
Nach dem gemeinsamen Mittagessen unternahmen wir einen Stadtrundgang und landeten am Ende in der Altstadt, und in einer urigen Gaststätte, in der selbstgebrautes Bier ausgeschenkt wurde. In wunderbarer Stimmung kehrten wir zu unserem Tagungslokal zurück und beendeten das schöne Treffen mit dem obligatorischen Kaffeetrinken.
Vielen Dank, Rolf Terjung, auch dieses Seniorentreffen ist sehr gut gelungen.
Foto:Heinz Papenfuß Hg

Archiv wartet auf Futter

Die Stiftung Bahn-Sozialwerk hat begonnen, ein Archiv über die Tätigkeit der Freizeitgruppen aufzubauen. Alle wichtigen und interessanten Unterlagen, Dokumente, Fotos, Dias, Aufzeichnungen, Artikel, die sich auf die Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung und das Leben ihrer Mitglieder beziehen, sollen der Nachwelt erhalten bleiben.
Alle Mitglieder, die meinen, für die Archivierung geeignete Unterlagen oder Gegenstände beisteuern zu können, werden gebeten, dieses mit kurzer Beschreibung mitzuteilen an Rolf Terjung, Finkenschlag 68, 47279 Duisburg. GEFA

El la grupoj Bremen: Vizito al Infanĝardeno

S-ino Elisabeth Kuhl-Kruse invitis la Esperanto-Grupon Bremen la okan de marto rigardi la infanĝardenon en kiu ŝi dejoras.
La konstruaĵo situas en bela, montareta regiono sur duno apud la Weser-rivero. Temis pri iama vilao de nobelulo kaj alkonstruita infanĝardentipa ejo. Kvazaŭ parko ĉirkaŭas la tuton kun elrigardo trans la rivero.
Elisabeth bonvenigis nin en la plenkreskul-kunvenejo, ĉar nur jen estis por ni taŭgaj seĝoj. Ŝi enkonduke klarigis la plej interesajn faktojn rilate al la situacio en tiu edukejo. Ni eksciis, ke en diversaj grupoj estas handikaptitaj infanoj integritaj. Ni aŭdis, kiel tiuj grupoj kune vivas, ludas, manĝas kaj ripozas. Krome estas en la grupoj granda parto da diversnaciuloj, kaj per tio ankaŭ diverslingvaj Infanoj. En tiu kvartalo vivas grandparte eksterlandanoj. Ili vivas grupe inter si kaj parolas nur siajn naciajn lingvojn. La infanoj venas en la infanĝardenon sen germanlingva kapablo. Sed – jam post unu jaro ili komprenas preskaŭ ĉion kaj eĉ parolas en la germana
Elisabeth montris al ni la ĉambrojn de la diversaj grupoj. Ĉiu grupo havas sian lud- kaj ripozĉambron. Specialajn instalaĵojn por handikaptitaj infanoj ni vidis en multaj lokoj. Ekzemple deklivaj ebenoj, per kiuj ili spertas teni la ekvilibron. Aliloke estis granda kesto plena da plastaj globoj, kiu servas samcele. Speciala ĉambro, kies planko estis kovrita per mola tapiŝo. Tie rampetas la plej junaj infanoj. Elisa-

beth klarigis al ni, ke per la rampetado ambaŭ cerbo-duonoj kontaktiĝas. Per tio la infanoj povas poste normale ĉiudirekte permane manipuli. "Tio estas tre grava aranĝo" diris s-ino Kruse.
Mi havas la impreson, ke tiu infanĝardeno estas vere beno por la etuloj por starti la vojon tra la vivo. Dankon, Elisabeth, por via interesa gvidado.

Hg

Frankfurt **Chinesischer Abend im Mai**

Unter dem Motto „Chinesische traditionelle Kultur und aktive Wissenschaft", dargeboten von Frau Wang und Professor Shen Chengru, stand das Treffen der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt in Verbindung mit der BSW-Espranto-Gruppe Frankfurt am 04. 05. 2000.
Wir hörten während ca. 70 Min. einen Vortrag über die heutige Situation in der VR China. Das Ehepaar hatte den wesentlichen Teil des Berichts auf große Plakate niedergeschrieben und diese Wandzeitungen an den Wänden des Clubraumes befestigt. Prof. Shen las die Texte vor und gab jeweils Erläuterungen dazu. Ferner hatten die Vortragenden Bilder aus China und der Esperantosprachigen Zeitschrift „El Popola Chinio" mitgebracht und ausgehängt.
U.a. wurden berührt: Die jetzige Wohnsituation in China, die kulturelle Entwicklung, das Verkehrswesen, verschiedene Aspekte der Wissenschaft, Essensgewohnheiten. Dabei wurde jeweils mit den Zuständen von vor ca. 50 Jahren verglichen (also vor der Revolution). Nach Abschluss des Vortrags gab es Gelegenheit für Fragen, wobei z.B. auch nach der Bedeutung der „Falun-Gong"-Bewegung gefragt wurde sowie nach den Beziehungen zwischen der VR China und Taiwan.
Insgesamt war es ein interessanter Abend, dem beizuwohnen sicher niemand der Anwesenden bereut hat.
Wir danken dem chinesischen Paar für den Vortrag. Walter Ullmann

Pasporta servo – 1075 Adressen von Gastgebern aus 76 Ländern

Der Verband der Esperanto-Weltjugend hat nun – wie bereits seit 1974 – für das Jahr 2000 ein 187-seitiges Taschenbuch mit 1075 Adressen von Gastgebern aus 76 Ländern herausgegeben. Das bedeutet eine 14- prozentige Erhöhung der Anzahl von Gastgebern in einem Jahr.
Die Esperanto-kundigen Reisenden können mit "Pasporta servo" kostenlos bei den Gastgebern übernachten und je nach Vereinbarung auch gegenseitige Besuche planen. Die Adressenliste ist erhältlich bei: Bücherdienst der Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Preis: 10,90 € plus Porto und Steuer von 6% in EU-Ländern.
Weitere Auskunft erteilt:

Egon Kiefer, Beauftragter für Esperanto,
Erthalstr. 6, 97816 Lohr am Main, Tel. 09352 6707

Fervojaj novaĵoj **Novaj nomoj**

Adiaŭo por la indiko "bileteldonejoj". Tiuj ricevis novan nomon "DB vojaĝcentro". Ankaŭ la t. n. Fervojaj Turistgiĉetoj (Bahn Touristik-Counter) nomiĝas nun "DB Vojaĝagentejo" (DB Reisebüros). "Railion GmbH" kun sidejo en Mainz estas la nova

indiko, sub kiu la vartrafiko de germana kaj nederlanda fervojoj kunlaboras kiel "Railion Germanio" kun sidejo en Mainz kaj "Railion Benelux" kun sidejo en Utreĥt. Neologismo estas ankaŭ nova fervoja profesio: mekatronikisto. Li devas esti kapabla interligi mekanikajn, pneŭmatikajn, hidraŭlikajn, elektrajn kaj elektronikajn sistemojn kaj eluzi ilin sensoplene. La instruado daŭras tri kaj duonan jarojn.

Nova teknologio por eŭropaj fervojoj

Nuntempe nova teknologio estas esplorata en Germanio, Francio kaj Italio por estonte anstataŭi la diversajn sistemojn de direktado kaj sekurigo. La ekzistantaj sistemoj malhelpas la liberan fervojtrafikon. Per Eŭropa Reltrafika Manaĝera Sistemo (ERTMS) kaj per trajnsekureca sistemo Eŭropa Trajnkontrolsistemo (ECTS) estas starigita fundamento por eŭropa normo. La signalkomunikado efektiviĝos ne plu per lokaj signaliloj, sed per radiofonio rekte al la monitoroj en la kondukistejoj de trajnoj. Germana Fervojo instalos similan teknologion jam en la konstruata grandrapida fervojlinio inter Frankfurt kaj Köln.

Radarinstalaĵo por traknivelaj pasejoj

Germana Fervojo havas nuntempe cirkaŭ 5000 traknivelajn pasejojn kun plene fermeblaj barieroj. Laŭleĝe ili devas esti regataj de bariergardistoj. DB intencas teleregardi tiujn barierojn sen bariergardista kontrolo, uzonte radarinstalaĵon. Tio baziĝas sur mikroonda radaraparato, kiu traserĉas paŝon post paŝo la danĝeran zonon inter la bariloj kaj mezuras samtempe la distancon inter la unuopaj eĥoj. La esplora elektroniko decidas por ĉiu paŝo, ĉu iu objekto troviĝas en la danĝera zono. La radaro devas tutklare rekoni ĉiuspecajn veturilojn de certa grandeco, ĉu el metalo, plasto aŭ ligno, ankaŭ en vintro aŭ nebulo. Kaze de difinitiva enkonduko plialtigos la sekureco, sed forfalos laborpostenoj de la koncernantaj bariergardistoj. Fonto: BahnZeit 10/99, 12/99 kaj 2/2000 aranĝis W.B.

Ĉu baldaŭ aerŝipoj?

Okaze de granda foiroj oni vidas ilin en la aero, malgrandajn aerŝipojn. Ili aspektas kiel pompaj cigaroj. Regataj de unu piloto la aerŝipo reklamas por certaj produktoj. Depost pli ol 60 jaroj ne plu ekzistas aerŝipoj, kiuj transportas pasaĝerojn, sed tio povus baldaŭ ŝanĝiĝi. En Friedrichshafen ekzistas jam prototipo de aerŝipo NT (nova teknologio). Ĝi estas 75 m longa. La interno entenas 8200 kubikmetrojn de malbruebla gazo Helium. La aerŝipo povas flugi ĝis 2500 m alten kaj transporti 7,9 t. La agoradiuso estas 1000 km kaj la rapido 130 km/h. Ekipita por la pasaĝertransporto la aerŝipo povas transporti 12 personojn krom du pilotoj. Alia entrepreno estas konstruanta pli grandan aerŝipon, kies longeco estas 240 m. Tiu aerŝipo kapablas transporti pezajn kargojn ĝis 160 t. W.B.

Fonto: Frankfurter Neue Presse August 99

Redaktfino por FE 3/00 estos la 20. 08. 2000
Herausgeber/eldonanto: Stiftung Bahn - Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schriftleitung /redakcio: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen
Textestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Gustav-Heinemann-Str. 70, 28215 Bremen